

Annette von Droste-
Hülshoff,

Lastaj vortoj

*tradukita de Joseph Fer-
dinand Berger*

Annette von Droste-Hülshoff,

Lastaj vortoj (0)

tradukita de Manfred Retzlaff

Annette von Droste-
Hülshoff,

Letzte Worte

Laŭvorta Esperantigo

Amatoj, kiam min forla-
sis
spirit', ne ploru do pro
mi!
Por paca ekzistad' min
kaŝis
en brila tag' la bona Di'.

Ne estas plu ĉagreno te-
ra.
Eternas via bild' ĉe mi.
Mi petos pri balzamo ve-
ra
por vundoj kaj dolor' de
vi.

Se svingas Pac' en nokta
ombro
Seraffugilojn super Ter',
ne pensu plu pri mia
tombo!
Salutas mi el stela sfer'.

...

Amatoj, kiam forpasis mia spirito,
ne postploru min per iu larmo;
ĉar tie, kie mi restadas, tie estas paco,
tie lumas al mi eterna tago.

Tie, kie ĉiu ter-aflikto estas malaper-
inta,
ne foriĝu via bildo al mi,
kaj mildigon por viaj vundoj,
por via doloro volas mi elpetegi.

Se dum la nokto blove svingas siajn
seraf-flugilojn
la paco super la mondo-regnon,
ne pensu tiam plu pri mia tombo,
ĉar el la stela spaco mi salutas vin.

...

Geliebte, wenn mein Geist ge-
schieden,
So weint mir keine Träne
nach;
Denn wo ich weile, dort ist
Frieden,
Dort leuchtet mir ein ew'ger
Tag.

Wo aller Erdengram ver-
schwunden,
Soll euer Bild mir nicht ver-
gehen,
Und Linderung für eure Wun-
den,
Für euern Schmerz will ich er-
flehn.

Weht nächtlich seine Seraphs-
flügel
Der Friede übers Weltenreich,
So denkt nicht mehr an mei-
nen Hügel,
Denn von den Sternen grüß'
ich euch!

...

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de JOSEPH FERDINAND BERGER (*1894-10-07 - †1976-03-28) en 1958.

Arg-160-467 (2009-11-22 09:37:58)

Tiu ĉi traduko de la poemo estas unue publikigita en 1958, ĝi aperis en la Esperantorevuo "Norda Prismo", n-ro 58/2, sur paĝo 74. Vidu ankaŭ la tt-ejon "<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Re->

[vuoj/np/np5802/lastaj.html](http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Re-vuoj/np/np5802/lastaj.html)" de s-ro Donald Harlow el Pinole CA-94564, Kalifornio. Malgraŭ la supra indiko la poemo ne estas verkita de la poetino mem, sed - laŭ pli nova scienca ekkono - de ŝia nevino Elisabeth, post la morto de Annette von Droste-Hülshoff. Oni ĝis nun nur atribuis la poemon al Annette von Droste-Hülshoff.

Pri Joseph Ferdinand Berger rigardu ankaŭ la retejon http://wapedia.mobi/eo/Joseph_Ferdinand_Berger#2.

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2004-05-16.

Arg-160-475 (2004-05-16 17:17:06)

Proksimuma laŭvorta Esperantigo de la origina germana-lingva teksto

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24).

Arg-160-315 (2004-05-27 10:56:26)

Dies Gedicht ist jedoch nach neueren wissenschaftlichen Erkenntnissen nicht von der Dichterin selbst verfasst worden, sondern, nachdem Annette verstorben war, von deren Nichte Elisabeth von Droste-Hülshoff (1845 - 1912). Man hat es aber bisher der Annette von Droste-Hülshoff zugeschrieben. Dies ist mir, Manfred Retzlaff, am 6. Februar 2003 von Frau Dr. Edda Baußmann, wissenschaftliche Mitarbeiterin der Droste-Gesellschaft (Am Rüschaus 81, D-48161 Münster, baussmann@drostegesellschaft.de - www.drostegesellschaft.de) fernschriftlich mitgeteilt worden.